Jaro VI. Marto, 1925. Numero 7

BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO: por Bulgarlando 30 levoj, por fremdlando 50 levoj (0·75 Sm.)	MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO	АБОНАМЕНТЪ: за България 30 лв. Обявления: кв см 2 лева Отдѣленъ брой 3 50 лева

Препоржчано отъ М-о Н. Пр. за учил. библ. съ окр. № 1870 отъ 27. I. 1922

12.

Ne estas la parolo pri la dekdu disĉiploj de la fondinto de kristanismo, nek pri la fama verko de Aleksandro Blok, pri io pli aktuala por ni, la bulgaraj esperantistoj, mi ekparolas:

pri nia XII Esperanto-Kongreso.

Por dekdua fojo ni manifestos antaŭ la bulgara socio nian volon doni facilan interkomprenilon al la popoloj, ni manifestos nian forton, kreskanta ĉiujare, kaj en tiu kreskado de nia forto ni montros al ĉiuj la efektivan bezonon de nia popolo je rimedo por facila interkompreniĝo kun la ceteraj popoloj.

Tiu manifestado okazos nur post kelkaj monatoj — dato jam proksima. Kaj ni devas demandi nin, ĉu ni jam pretiĝis por unu vere imponanta manifestado

antaŭ niaj amikoj kaj antaŭ niaj kontraŭuloj?

Ni ja scias, ke ĉiu afero, la plej nobla, havas kontraŭulojn: la rutinaj fortoj en la vivo, kiuj ofte estas tre potencaj. Por kontraŭbatali iliajn atakojn ni devas prepari nin. Kun tia intenco la XI kongreso en Ruse komisiis la aranĝon de la XII-a al la Sofia, ĉefurba sekcio. La celo estas ataki en la centron per tutaj fortoj. Ĉu ni ion sukcesos?

Ni devas tamen memori, ke nia plej granda kontraŭulo kaj malamiko ne estas tiuj rutinaj fortoj — ilin ni povas ĉiam venki. La plej danĝera malamiko povas enloĝi nur interne en ni:

la malsolidareco.

Timu kaj evitu ĝin. Je tiu grandsignifa por ni kongreso ni devas montri, manifesti kaj forte akcenti antaŭ ĉio:

nian solidarecon.

Havante ĝin, ni staras sur plej firma pozicio.

For la personaj malakordiĝoj — en nia laboro por Esperanto ni devas senti la baton nur de unu komuna koro en ni ĉiuj — la koro de l'homaro.

Do, kun forta kredo kaj firma volo ni pretiĝu por Sofia.

D. S.

EL LA BULGARA LITERATURO.

Dimĉo Debeljanov.

Legendo pri la malĉasta princino.

„Mon âme est une Infante".
Albert Samain.

1.

. . . Kaj tie, sur la bordo senvorta kaj senkanta
En batoj kaj karesoj de maro la eterna,
Kastelo praantikva — fidela deĵoranto —
Kastel' enigma supren talion mutan sternas.

En velkaj la ĝardenoj, revante veron timan
La trema ros' reflektas malĝojon kaj malsanon,
Kaj de sendormaj arboj sonĝaron la senliman
Spegulas morta akvo de mortaj la fontanoj.

Kaj muroj kaj kupoloj rompiĝas malrapide
Kaj musk' per akraj ungoj detruas la kolonojn;
Neniu sonorilo en tiu korp' rigida,
Neniu korn' arĝenta solenajn ĵetas sonojn.

Nur iam tiel sonĝe malforta vent' ekblovas
Kaj en la trem' malsana de ĝemo tra l'kolonoj
Dolor' ekeĥas nigra pri gloro la malnova
De ies vidviĝinta, sengloriĝita trono.


2.

Kiu do ekploris en
La salonoj mutaj, mortaj?
Ĉu silent' malĝojon vortas
Pri estinta la seren'?


Kiu sur la turon iris
Kaj, enue, sub stelar'
Manojn al abism' eltiris —
Al la nefidinda mar'?

Kies spir' haltiĝis en
Branĉoj ombraj kaj senordaj?
— Lun', kurante al la bordoj,
Sternas muton tra l'ĝarden'.

Trad. *St. Ĝuĝev.*



LIBERO



Monata revuo internacia de movadoj por la reformigo de la vivo

Redakcio kaj administracio:
„LIBERO“ str. „Vitoŝka“, 48
Sofia, Bulgario

Eldono de:
Koopera Eldonejo „Posrednik“
Sofia, Bulgario

UNUA PAROLO

Ni estas atestantoj de luktoj en la homa socio. Ekzistas du frontoj. Sed ne estas la frontoj de la kapitalismo kontraŭ la proletaro pri kiu ni parolas. Ekzistas la frontoj de la Perforto unuflanke kaj la fronto de l' **Amo aliflanke**. La homaro memoras jam de la unuaj siaj tagoj pri la luktado inter tiuj du frontoj. La nunaj bataloj inter la kapitalismo kaj la proletaro, kiel multaj similaj bataloj en la pasinteco de l' homa socio, okazas post la barikado de la vera frontlinio — en la regno de l' Perforto. Tie estas ĉiuj kredantaj ke perforte, per la brutala forto, per armilo oni povas plibonigi la vivon kaj la homaron.

En la dua fronto restas la grandaj Majstroj de l' homaro kiel Lao Tze, Konfucio, Budha, Sokrato, Kristo, Tolstoj k. a., kaj ĉiuj kredantoj ke nur per Amo kaj Bono estas atingebla la vivcelo: klare engravurita en ĉies homa koro.

Esti internacia organo de tiu fronto de l' Amo, en kiu viciĝas la vastaj popolaj amasoj, konservintaj la purecon de sia animo, fortigi ĉe ili la konscion ke la Amo ilin gvidanta estas la ĉie reganta Leĝo, impulsanta la veran homon, celas **Libero**.

Prezenti al la mondo tutecan mondrigardon de la Neperfortulo, testamentita de ĉiuj grandaj Majstroj de l' homaro, estas la programo de **Libero.**

Koordinigi per la internacia lingvo la agadon de ĉiuj kulturaj movadoj kaj organizaĵoj en la diversaj landoj al unu celo: vera interhoma paco, estas la tasko de **Libero.**

Programo grandioza, sed tamen plenumebla per la unuigitaj fortoj de ĉiuj pacaspirantoj. Ke ni ricevos la apogon kaj la subtenon de ĉiuj sinceraj batalantoj por la surtera paco, ni forte kredas. Jam nun ni ricevis apogon de ĉiuj ko ataj al ni agantoj en tiu direkto, al kiuj ni sin turnis. Ni ankaŭ kredas ke revokos sin ankaŭ tiuj samcelanoj, kies adresojn ni ne scias, sekve ne persone invitis al kunlaborado, kaj ili tuj interrilatos kun ni. La afero estas ja komuna, ne nia.

Tro multe ni ankaŭ esperas je la servoj de la internacia lingvo, dank' al sia vastigo en ĉiuj terpartoj ĝi povas esti nia plej valora helpanto, nome pro tio ni elektis ĝin kiel unuigilo inter homar' anoj.

En detaloj la programo de **Libero** montriĝas jene:

Vivdemandoj traktataj laŭ vidpunkto de libera kristanismo lumigita per la instruo de Leo Tolstoj· ne partopreno en la perforto kaj nekontraŭstaro al la malbono per malbono.

Kontraŭmilitismo. En la paĝoj de **Libero** aperos la Bulteno de la Internacio de Kontraŭmilitistoj, kies aparta esperanta eldono, laŭ interkonsento, estas ĉesigata.

Areaj demandoj kaj reformoj laŭ H. George.

Vegetarismo: sensanga nutrado. „Ne mortigu" estas universala leĝo.

Kontraŭalkoholismo kaj kontraŭ tabakfumado. Naturkuracado.

Interna ideo de Esperanto. Ideoj de la kreinto de Esperanto pri la homaranismo estas ideoj tre parencaj al **Libero** sed neligitaj kun la lingvo mem. **Libero** tamen per ĉiuj fortoj akcelos la uzadon de Esperanto por vere kulturaj celoj, ĉar nur tiam Esperanto alportos ion novan, ion celindan por la homaro — se ĝi estas akirita kiel plia lingvo nur, ĝi estas superflua. Kaj ĉiu esperantisto bone scias kio instigis Zamenhof krei la lingvon.

Novaĵoj kaj sciigoj el la kultura vivo, oficialaj sciigoj de kulturaj organizaĵoj ktp. Literaturaĵoj en la sama spirito.

Unuvorte, **Libero** celas fariĝi vera org·no de la kultura vivo sur nia terglobo.

Libero ankaŭ eldonos vicon da verkoj ena partaj broŝuroj pri la diversaj demandoj de ĝia programo.

Tiuj ĉi unuaj vortoj, ni esperas, donas bonan ideon pri la nova esperanto-gazeto, kaj ties celoj trovos certe ĉies subtenon. En ĉi espero ni ekagas por la granda ideo ge **Libero.**

LA REDAKCIO

„LIBERO"

JARABONO: Argentino: 3. pez., Aŭstralio: 4 ŝ., Aŭstrio: 45 mil. kr.; Belgio: 14.-fr., Brazilio: 8 milr., Britlando: 4 ŝ., Bulgario: 60 lv.. Ĉeĥoslovakio: 25 kr., Ĉinio: arĝ. dol. 1·50, Danmarko: 4 kr., Estonio: 250 mk., Finlando: 25 mk., Francio: 14 fr., Germanio: Mk. or. 3, Greklando: D. 50; Hispanio: 5 pes , Hungario: 55.000 kr.; Italio: 18 L., Japanio: 2. J., Jugoslavio: 45 din., Latvio: 4.; Litovio: 8 L., Nederlando: 2 fl., Norvegio: 6 kr., Pollando: 4 Zlot., Portugalio: 20 Esk., Rumanio: 125 Lei., S. S. R. S.: 2 or. rubloj, Svedlando: 4 kr., Svislando: 4 fr., Turkio: 1·40 Ltq., U. S. A., Kanado: 1 Dol.

El Amerikaj landoj kaj Orienta Azio oni pagu en dolaroj U. S. A. laŭ la taga kurzo. El Estonio, Finnlando, Hispanio, Latvio, Litovio, Pollando, Po tugalio prefere oni pagu en angla aŭ svisa mono laŭ tiu ĉi tarifo kaj la taga kurzo.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu 4 sv. fr. aŭ 1 Dol.

Dimĉo Debeljanov.

Elegio.

Reveni hejmen en la patra domo,
kiam ekmortas la vesper' humile,
kaj por azili malfeliĉajn homojn
malfermas mildan sinon nokt' trankvila.
Lasinte kiel ŝarĝon lacon nigran,
senĝoje destinitan de la sorto,
ekveki, kiel gast' post longa migro,
per timaj paŝoj ĝojon en la korto.

Renkonti vin, patrino, sur la sojlo,
metinte frunton sur malforta mano,
rezigni en rideto ŝia mola
kaj longe ripetadi: panjo, panjo . . .
La ĉambron enirinte jam humile,
al vi konatan, ĝi — halt' lasta paca,
ekflustri mildajn vortojn en trankvilo,
fiksinte al ikon' okulojn lacajn.
Ĉar mia suno estas subirinta
mi venis ĝisatendi pacan finon.
— — — — — — — — — —
Ho, vanaj ĝemoj de la formigrinto,
rememorinta hejmon kaj patrinon.

Trad. *Zah. Zahariev.*

Asen Razcvetnikov.

Senmortaj.

Fumas ankoraŭ ŝtiparoj en cindro,
daŭre la klingo avidas je sango,
falas ankoraŭ sur stepoj mortintaj
tagoj de murdoj kaj noktoj de sangoj.

Tamen — hardite per fajro kaj glavo,
post venktriumf' kaj malvenka perturbo,
brakojn denove levitaj ni havas
kaj ni denove minacas la urbojn.

Ja niaj brakoj elkreskis fortikaj,
Ŝtono kaj nigra hum' estas la ŝultroj.
Ni estas grizaj, senmortaj formikoj,
ni — la amaso — harditaj kaj multaj!

Ho, ni trapasos potence-fieraj
kavojn kaj tombojn senkrucajn en lukto
kaj, trarompinte pordegojn el fero
ŝiros ni for — sen permeso — la frukton!

Trad. *Asen Grigorov.*

Vladimir Rusaliev.

Kruco.

El „Psalmoj kaj preĝoj".

1.

KIEL infano vi estas senkulpa kaj timema.

Kaj pro blankaj sonĝoj kaj pro lazuraj aspiroj vi estas tiom pala kaj diafana.

Kvazaŭ tra vi oni povus rigardi.

Mi scias: — vi povus esti hejmo de mia senhejma animo.

Kaj vi povus doni al mi tiom multe da feliĉo kaj tiel daŭran konsolon —

Por ke mi pensu neniam pri alia knabino, kaj por ke mi estu ĉiam via.

Sed diru al mi: — kion fari, ĉar neniu el miaj vojoj kondukas al vi?

Kaj ĉar mi devas dividi mian koron ankaŭ inter tiuj viaj fratinoj malriĉaj, kiuj renkontas sian printempon blankharare, kaj velkadas sub nigraj kaptukoj dum malsato kaj mizero . . .

Diru al mi: — kion fari?

2.

KAJ JEN: — kiam denove la suno kun flamantaj lipoj kisos la teron kaj la Balkano ekkantos ribelan kanton:

Mi ekiros.

Mi ekiros kun disŝirta bluzo kaj kun pala vizaĝo tra la bruligitaj vilaĝoj kaj tra la saturitaj per sango grenkampoj: —

por serĉi la veron.

3.

SED MI SCIAS: — kiam mi venos adiaŭi por ĉiam kun vi . . .

Kaj kiam mi transpaŝos vian sojlon:

Vi ekiros post mi.

Kaj vi kaptos miajn manojn.

Dolore vi premos ilin al via koro kaj ekploros vi pro ĉagreno.

Mi scias: — vi ne volos lasi min foriri.

4.

SED: — diru al mi: — kiom valoras via eta malĝojo antaŭ la malĝojoj de milionoj da subpremitoj juge.

Kaj kiom valoras viaj larmoj antaŭ tiuj de la marliĉaj infanoj, kiuj per sangigitaj kaj glaciiĝintaj fingroj fosadis la neĝon por serĉi la ostojn de siaj kruele murditaj patro kaj fratoj?

5.

KAJ TAMEN estas ĉagrene al mi.

Restinte sen mi vi forvelkos kiel prujnofrapita floro.

Viaj okuloj ekmalheliĝos pro malĝojo.

Viaj brakoj eksimilos liliojn.
Kaj via animo kun terurigitaj okuloj enrigardos en mian animon kaj ekploros super ĝi pri la blankaj noktoj de nia pasinto...
Mi scias.

6.

ĈAGRENE estas ankaŭ al mi.
Sed ni estas infanoj de du malsamaj sortoj.
Kaj mi ne vivpovas sen miaj malriĉaj fratoj kaj fratinoj.
Mi ne povas.
Al mi ili estas pli valoraj ol vi.
Kaj ilia veo igus mian koron fari heroaĵon por ili.
Ĝi igus min doni mian vivon . . .

7.

SED se via amo estas tiom granda,
Kaj se vi volas posedi min por ĉiam: —
ekiru post mi.
Delasu la orajn ornamaĵojn de via hararo.
Delasu la mantelon, el silko kaj el arĝento trikitan, kaj vestite en blua bluzo kiel miaj fratinoj: —
ekiru post mi.
Kaj ĉu vi scias: — ho, kiel mi kisus tra larmoj viajn manojn, kiuj ĝis nun estis palaj pro la brilo de la multekostaj ringoj — viajn manojn, se ili malgraciiĝos pro laboro, kaj se ili karesados la velkintajn vangojn de la frostiĝintaj orfetoj.
Ĉu vi scias?
Ĉu vi scias: — ankoraŭ kiom pli forte mi amus vin, se mi vidos vin vaganta kiel flegistino al kabano, —
Por doni konsolon kaj ĝojon al tiuj, kiuj dum tuta vivo estis malĝojaj kaj malfeliĉaj . . .
Ĉu vi scias? . . .

Sofia. Trad. *Zah. Zahariev.*

Elin-Pelin.

La senviva kampo.

Mi amas la kampon, ĉi tiun larĝan ebenaĵon, kiu estas limigita per la horizonta linio. Mi ofte priskribis ĝin, mi ofte observis ĝin kaj mi ofte travagis ĝin. Ĉiam ĝi plaĉis al mi kaj mi trovis en ĝi ion belan, ion agrablan.

Hieraŭ unuafoje ĝi ne plaĉis al mi, glaciigitaj strioj kuŝis tie ĉi kaj tie sur la velkinta herbo, trans kiu nigris la tero. Malseka nebulo kuŝis super ĝi kiel malbonkvalita haladzo. Ie vidiĝis rompita dometaĉo. Granda nigra birdo flugis malalte, malrapide kaj solece. Ĝi ne similis vivantaĵon, sed ian malgrandan fermaŝineton, kiu malvarmigis la aeron. Ĉe muelejo du viroj hakis grandan salikon kaj tio memorigis al mi ian terurigan malsanulejon, kie oni forhakas homajn piedojn. Ĉie estis malbele, malgaje kaj malvarme. La kampo estis senviva.

Sofia. Trad. *Geo Ĥarŝev.*

La literatura fako en „Bulgara Esperantisto“.

Eble, la levado de tia demando en la „monata organo de la Bulgara Esperantista Societo“ aspektos strange al kelkiuj. Organo de ies organizaĵo okupiĝas pri organizaj demandoj. „Bulg. Esperantisto“ ankaŭ okupiĝas pri organizaj aferoj. Tamen, eĉ la unuaj redaktoroj eksentis ke „BE“ ne povas kaj ne devas priokupi sin *sole* pri organizaj demandoj. La esperantista movado estas kultura fenomeno, pro tio ĝi kaj ĝia organo ne devas eviti la literaturajn demandojn. Des plie. Ankoraŭ la unuaj redaktoroj kvazaŭ eksentis, ke oni devas fari ion por la kreo de l'tutmonda esperanta literaturo — unu el la plej trafaj rimedoj, por ke esperanto estu alprenita kiel internacia lingvo. Kaj ili provis. Kaj ili donis ion. Ili tradukadis el niaj kaj fremdaj aŭtoroj, represis versaĵojn (el Zamenhof), skribadis artikolojn sur pure literaturaj demandoj: Ivan Vazov — notoj — Ada, Hristo Botev — Ada, „Evoluo de la moderna pentrarto“ k. a.

Ili eĉ malfermis la paĝojn de BE al distingiĝintaj esperantaj poetoj aŭ poetaĉoj.

Tiel eĉ la unuaj redaktoroj aranĝis senkonscie la literaturan fakon en BE. Tamen tiu aplaŭdinda komenco, eble renkontos la malaprobon de kelkiuj. Sed tio ne devas ĉesigi la literaturan laboron. La sintenado, la konduto al ĝi ne devas esti kontraŭula, ne devas esti eĉ indiferenta.

Post tiuj kelkaj paroloj ni alpaŝu al la kritiko de la literatura fako kaj de tio: kion ĝi devis doni kaj kion ĝi donis dum la pasintaj kaj dum la kuranta jarkolektoj.

La celo de la tradukantoj el la bulgara lingvo en esperanton devas esti (klare kaj ne dusence): doni la plej bonajn valoraĵojn de la bulg. literaturo en esperanta traduko.

Sed, por ke tiu celo efektiviĝu estas necesaj nur la konvenaj personoj. Ĉar: literatura iniciato ne devas esti gvidata de personoj, kiuj tute hazarde kaj intertempe okupiĝas pri literaturo. Ilia laboro surŝarĝas ilin per neevitebla morala respondeco. Kaj tiam ne sufiĉas sole la intencoj, kiom ajn ili estu laŭdindaj; necesas faroj — rezultoj!

La unuaj redaktoroj de BE havis (tio estas evidenta) la necesan aron da intencoj. Sed efektivigante siajn intencojn, ili faris malmulton, el literatura vidpunkto. Ili renkontis malhelpaĵojn kiujn ili devis venki. Ili devis solvi la demandojn: kion, kiel kaj kiu tradukos. Pri originala esp. literaturo ankoraŭ oni ne povus paroli. Ĝi aperas apenaŭ en la lastaj du jarkolektoj. Pri ĝi ni parolos poste.

Kapablaj kaj talentaj homoj estas necesaj por simila laboro. Kaj Iv. Dobrev, Ada estas kapablaj kaj ankaŭ talentaj. La unua jam pruvis tion per siaj majstraj tradukoj el Botev. Sed kiom ajn talentaj kaj kapablaj ili estis, la manko de aliaj konstantaj kunlaborantoj malhelpis al ili fini sian laboron. Konsciaj tradukantoj necesas, homoj kun kritika penso kaj artaj konceptoj. La malk-

lera tradukanto tradukas hazarde kaj senkonscie. Kaj pro lia kunvivo kun la literaturo naskiĝas bastardo — t. e. literatura miskompreno, fuŝaĵo. Tio okazis kun multaj niaj tradukintoj, kiuj tradukis ĉu pro enuo, ĉu por . . . gloreto. Tradukas ili versaĵojn longajn, kadukajn, de homoj, kiuj estis poetoj nek en tiu, nek en la alia mondo. Unu tradukas (jaro V, num. 4), kun la permeso de la aŭtoro, longan kaj sensignifan verkaĵon el nia literaturo, alia tradukas el niaj grandaj poetoj kaj verkistoj, sed sen la necesa gusto kaj elekto. La esperantisto tradukanto, post kiam li komprenos kaj scios kiujn poetojn traduki, devas elekti kaj traduki iliajn plej valorajn verkaĵojn. Niaj tradukintoj tradukadis el Petko Slavejkov, Elin-Pelin, Hristo Botev, Javorov, Debeljanov, Rajnov kaj lastatempe el Smirnenski, Em. p. Dimitrov, Rascvetnikov, Karalijĉev k. a. Tamen malmultaj provis traduki ion el niaj popolaj kantoj, kiel ankaŭ malmultaj laboras kun amo kaj seriozeco.

El niaj tradukintoj kiel talenta homo distingiĝis unue *Ivan Dobrev* per siaj perfektaj tradukaĵoj el Botev. (Bone li agos se li donos al ni la tutan Botev'on en ia zorgeme tradukita libreto). La forto de Botev estas tiel bone konservita kaj donita en la esp. traduko, kiel oni ne povis fari en la rusan kaj aliajn lingvojn. La senmortaj versoj de Botev:

„Тозъ който падне въ бой за свобода"

estas egalaj al la originalo.

„Ja, kiu falos por la Libero
mortos neniam. Por li ekploras
naturo, besto, nubo kaj tero
kaj bardoj mirakante lin gloras".

Aŭ tiu verso atinginta per la soneco de la aliteracio maloftan majstrecon

„Balkano kantas kanton ribelan"

kaj same

Dio mia, justa Dio,
ne vi en ĉiela foro,
mi nun preĝas al vi Dio,
kiun sentas mi en koro.

Preskaŭ ĉie estas konceptita kaj transdonita la interna dinamika ritmo de Botev.

Aŭdu, kiel arbar' ĝemadas
kiel ludas venteg' krakanta!

Ĉi tie se Dobrev estus evitinta la vorton *kiel*, kiu estas neakcentita, la versoj estus pli bonaj. En la tradukoj de Ivan Dobrev estas ĉio, kio povas kontentigi la kritikan leganton. La ribela temperamento de nia granda poeto kvazaŭ havas ion komunan kun la temperamento de Ivan Dobrev. Tial li trafe tradukas versaĵojn kun ribela motivo. Samajn li devas tradukadi. Liaj tradukoj el Javorov kaj Debeljanov ne estas malpli bonaj. Ivan Dobrev povas esti bona majstro de la *tradukado*.

Alia kapabla tradukanto estas *At. D. Atanasov* — homo laboranta delonge en la esperanta movado kaj homo kun multaj meritoj. En la literatura fako li ankaŭ kunlaboris fervore: liaj notoj pri Vazov, Botev k. a. Li tradukas la malnovajn aŭtorojn: Petko Slavejkov — La fonto de la Blankpiedulino. Li ankaŭ tradukas majstre per tre bona posedo de la lingvo. Grandan impreson faris al mi malgranda traduko de unu popola kanto. Ĝis antaŭ nelonge mi kredis, ke la popolaj verkaĵoj ne estas tradukeblaj esperanten, kaj tradukite, ili perdus sian tutan belecon kaj freŝeĉon. Sed Ada plej elokvente konvinkis min en la kontraŭo. Kun egala ĝuo mi legus la originalon kaj la tradukon:

„Virin' iras, virin' iras tra verda arbaro".

Lastatempe Ada estas ĉesinta la tradukadon de popolaj kantoj kaj tiu sola traduko, nur ĝi, estas tro malmulte — malmultege. Ada devas daŭrigi sian laboron. Tiam nur oni povus paroli kun pli granda certeco pri serioza, sed ne hazarda laboro. La presigo de similaj tradukaĵoj senteble plibonigos la redaktadon de BE, kiu tamen lastatempe pliboniĝis post la redaktorigo de kelkaj junaj homoj.

Sed . . . sur la demando. Krom tiuj tradukintoj dum la lasta jaro la esperantista publiko estis agrable surprizita de la apero de nova kaj juna homo: *Zahari Zahariev,* kiu precipe postkiam okupis redaktoran postenon en BE donis tre senteblajn pruvojn pri sia indeco. Liaj tradukoj estas elegantaj, kun preciza verso kaj varma sento. Rememoru: Florvendistino de Smirnenski

„Vitoŝ estas ĉi-vespere tiel milda kaj mistera".

La majstrado de la verso, la precizeco de la traduko envicigas lin vice kun la ambaŭ ceteraj kiel inda kolego, anstataŭanto, eĉ rivalo. Lia plej granda valoro estas en tio, *ke li scias kion traduki.* Li elektas la plej belan en nia nuntempa poezio kaj donas ĝin al ni: Hr. Smirnenski — Florvendistino, Em. Dimitrov — Iren', Asen Razcvetnikov — Kajno. De postkiam li eniris la redakcion de BE li aranĝis konstantan rubrikon „El la bulgara poezio". Tio jam montras kiom valora li estas kiel redaktoro. BE sub lia redaktado akceptis iom pli agrablan aspekton. Ni esperu ke li donos al ni pli grandajn kaj pli valorajn rezultatojn.

Ankoraŭ unu nova kunlaboranto de la suprecititaj estas *Asen Grigorov* kaj kune kun li la malnova kaj laborema Miti. Poste sekvas ankoraŭ kelkaj malpli valoraj tradukintoj kiuj de tempo al tempo tradukas ion sen trafa elekto kaj sen ia signifo. Miti estas doninta multajn tradukojn, sed bedaŭrinde ne ĉiuj estas trafe elektitaj. Miti tradukas Penĉo Slavejkov'on — poeto kun granda literatur-historia signifo por la bulgaroj, sed ne tiom interesa por la tutmonda esperantistaro. Eĉ kiam Miti ektuŝas nuntempajn poetojn (Smirnenski) li ne scipovas elekti la plej tradukindan versaĵon, sed li donas al ni ian hazardan boheman verkaĵon de la poeto. Miti kiel ankaŭ Asen Grigorov povas bone traduki — tio estas ilia indeco; sed ili devas traduki per kritika taksado — tio estas ilia devo. (Ne estas valoraj la sensignifaj tradukaĵoj de Asen Grigorov el Nik. Vas. Rakitin).

Fine mi povas diri, ke bonaj tradukantoj ĉe ni ne mankas. Kapablo al ili ankaŭ ne mankas. La rezultatoj de ilia laboroj estas atendendaj.

Notinde estas, ke en BE distingiĝis kelkaj originalaj esperantaj poetoj (Zahari Zahariev, Miti, Asen Grigorov k. a.). Ilia laboro meritas specialan atenton kaj priskribon. Tion mi lasos por sekvanta artikolo.

Marko B.

Rimarko de la redakcio. Samideano Marko B. havis la laŭdindan intencon prezenti al ni literaturan kritikon de la literaturaĵoj presataj en BE, — ni bezonas tian kritikon. Ĝi estas garantio ke se ni ion kreos, la kreotaĵo valoros. Pro liaj bonegaj intencoj ni gratulas lin. Ni ŝuldas tamen malgrandan rimarkon, rilate la enkondukan partan de lia artikolo.

Li ne pravas asertante ke BE kiel organo de organizaĵo estis destinita nur por oficialaj sciigoj kaj nur „senkonscie la unuaj redaktoroj aranĝis la literaturan fakon". Samideano Marko B. estas juna samideano, sed se li estus traleginta ankaŭ la neliteraturan parton de la antaŭaj jarkolektoj, li scius ke en la programo de la organo estas tute konscie metita la punkto: konatigi la esperantan nebulgaran publikon kun la bulgara literaturo.

La unuaj redaktoroj kaj kunlaborantoj plenumis tiun punkton laŭ siaj kapabloj — la kritiko diros sian parolon pri ilia laboro, sed tiu laboro estis celkonscia. Kaj neniu ĝis nun kontraŭis tion, neniu ĝin malaprobos estonte, sed ĉiuj kiel samideano M. ĝin plene subtenos, ĉu per kunlaboro, ĉu per kritiko.

Inter ni.

Plendas samideano Ivan Sarafov el Pleven. Al multaj li sendis la ĵurnalon „Verda Stelo", sed oni ne reguligas siajn kontojn, ne pagas ... Kaj tiu malakurateco metas lin en tre malfacilan situacion. Li petas — la ŝuldantoj silentas.

Plendas la samideanoj el Sofio, kiuj eldonis la propagandan ĵurnalon „Esperanto" por la verda semajno: ili dissendis la ĵurnalon al la grupoj kaj al apartaj samideanoj, oni la ekzemplerojn vendis, sed la sumojn ne sendis. Oni nur sendis laŭdajn leterojn al la redaktintoj por la bona propagandilo.

Plendas la grupo en la urbo X: samideano tiu kaj tiu, ĉe kiu estas grupa sumo, ne donas ĝin. Same en la urbo Y: la kasisto bonvolis forlasi la urbon, ne transdoninte la kason. Same en Z . . .

Plendas ankaŭ la societo . . .

Malbona afero. Malbonega ĝi estos, se ĝi fariĝos sistemo.

Al kio ĝi estas ŝuldata?

Al nia psikologio, al nia inerteco, al nia malakuratemo.

Ĉiu pensas: eh, la afero ne dependas nur de mia malgranda ŝuldeto. La societo ne pereos sen ĝi. Ja mi frue aŭ malfrue pagos ĝin. Tio ne estas mono perdita.

La malbono estas, ke *ĉiu* rezonas tiel kaj *ĉiu* pravigas sian inertecon.

Ĉu oni komprenas, kia malutilo estas farata al la afero per tia konduto? Ĉu oni komprenas, kiom da entreprenemo kaj iniciatemo estas mortigataj nur dank' al tia rezonado?

Simpla, simplega vero, sciebla de ĉiu: kiam vi vendis senditajn al vi librojn, *la mono ne estas via*, komprenu tion, kaj honeste redonu ĝin al la rajtanto. Se vi havas en la momento bezonon, ĉu tio pravigas, ke vi uzu la fremdan monon kaj, por eviti mem la malfacilaĵon, venigu tian al alia?

* * *

Oni ne povas prezenti al si, kiom suferas la societo pro tiu difekto en nia movado.

La societo ĉiam havas ŝuldantojn, ĉiam havas kolektotajn sumojn. Kaj ofte, ĉe bezono, ĝi devas serĉi prunte monon, kvankam, se la ŝuldantoj estus pli akurataj, ĝi povus ĉiam disponi sian monon kaj agi „kun malligitaj manoj".

Kiel elkuraci nin el tiu ĉi malsano, la neakurateco?

Jen demando, kiu devas interesigi ĉiun samideanon, kiu amas la aferon kaj deziras ĝian sukceson.

Laŭ mi, necesa estas interna kontrolo de ĉiu aparta samideano. Ordinare la kasistoj de la lokaj grupoj tenas ĉe si la sumojn kaj ĝuste ilia inerteco estas la plej danĝera. Kiam unu membro pagas sian kotizon, li rajtas demandi, ĉu oni sendas la necesan parton al la societa kaso, kaj tiel li scios, ke li estas efektive membro regula de la societo en ĉiu rilato.

Sed ne nur pri la kotizoj oni devos kontroli la kasistojn. Pri ĉiu sumo, kiu devas esti sendata de la grupo al la societo, aŭ al aliaj samideanoj, oni devos devigi la kasiston pagi ĝin. La nepagado malaltigas la prestiĝon ne de la persono, sed de la grupo!

Ni faru la akuratecon kulto por ni, se ni deziras seriozan laboron kaj seriozajn iniciatojn. Ni estu disciplinitaj kaj akurataj. Kaj ĝis kiam ni sukcesos fari tiun ĉi econ nia kutimo, ni estu pedante postulemaj de ĉiu — kaj antaŭ ĉio de ni mem.

Akcipitro.

Sciigoj — Известия.

De la kancelario.

— Поради нещастна случка секретарь-касиера е принуденъ да прекара известно време на легло. Взети сж мѣрки работата да не прекжсва, но въ всѣки случай най-напредъ ще се изпълняватъ само най-бързитѣ поржчки.

— Четвъртото издание на учебника „Курсъ по есперанто" е вече готово. Цената на учебника е 20 лева. На есперантски групи и книжари, които направятъ поржчки най-малко за 10 екземпляра, се ползуватъ съ 20% отстжпка. При поржчки за по-малко отъ 10 екз. прибавяйте и 20% за пощенски разноски.

Libroj kaj gazetoj.

Arbeider-Esperantisten, № 1—2, 1925, Oslo, Norvegio.
Norks Bokbinder-Tidende, № 3, 1925, Oslo, Norvegio.
Bulteno, № 2, 1925, Antverpeno, Belgio.
Litova Stelo, № 1—2, 1925, Kaunas, Litovujo.
Der Kriegsdienstgegner, № 1, 1925, Vieno, Aŭstrio.
Esperanto, № 293, (1), 1925, Ĝenevo, Svislando.
Der Arbeiter-Esperantist, № 2—3, 1925, Leipzig. Germanio.
Sud-Ameriko, № 1, 1925, Montevideo, Uragvajo.
Movado, № 7, 1924, Helsingfors, Finnlando.
La Suda Kruco,, № 55, 1925, Melburno, Aŭstralio.
Novaj Tempoj, № 1, 1925, Leipzig, Germanio.
Espero Katolika, № 6, 1925, Paris, Francio.
La Fervojisto, № 4, 1925, Zagreb, Jugoslavio.
Svenska-Esperanto Tidningen, № 2, 1925, Stockholm, Svedujo.
Svenska Arbetar-Esperantisten, № 2, 1925, Göteborg, Svedujo.
Amerika Esperantisto, № 6, 1924, Boston, U. S. A.
Konkordo, № 1, 1925, Zagreb, Jugoslavio.
La Progreso, № 2—3, Praha, Ĉeĥoslovakio.
Esperantista Junularo, № 23—24, 1925, Leitmeritz. Germ.
Itala Esperanta Revuo, № 1, 1925, S.Vito al Tagliamento, Italio.
Literatura Mondo, № 1, 2, 3, 1925, Budapest, Hungario.
Germana Esperantisto, № 2, 1925, Berlin, Germanio.
Heroldo de Esperanto, 1925, ricevata ĉiusemajne, Horrem, Germanio.
Kataluna Esperantisto, № 7—8, 1925, Barcelona, Katalunio.
International Language, № 2, 1925, Mid-Monthly, Britujo.
La Suno Hispana, № 93, 1925, Valencia, Hispanio.
La Ora Epoko, № 9, 19 5, Aargau, Svisujo.
Кратъкъ курсъ по Есперанто отъ Иванъ Сарафовъ, библиотека „Зелена Звезда" № 7—12, 64 стр. цена 12 лева, Плевенъ 1925.

Bulgara Antologio (prozo kaj poezio), kunmetis Ivan H. Krestanov, kun Antaŭparolo de At. D. Atanasov, Sofia, eldono de Bulgara Esperanto Biblioteko, II serio, № 5—6, 1925, paĝoj 248, prezo 100 leva, (5 sv. frankoj).

Esperanton povas profiti plej multe la malgrandaj nacioj. Elportante sur la internacia sceno la trezorojn de sia spirita vivo, ili povos per Esperanto plej bone diskonigi sian landon, popolon kaj vivon. kaj gajni tiamaniere la estimon kaj la amon de la fremduloj. Imitindan ekzemplon montris la hungaroj, kiuj per siaj talentaj verkistoj Baghy, Kalocsay k. a. faris jam multon. Ankaŭ la bulgaroj ne estas la lastaj en tiu rilato. Bedaŭrinde, eĉ ĝis nun Bulgarujo estas konsiderata de multaj fremdnacianoj kiel lando de duonsovaĝa popolo. Por forigi tiun malveran kaj malbonan famon, la plej trafa rimedo estas: konatigi la fremdulojn kun ni, t. e. iri laŭ la suprecitita vojo.

En tia okazo la apero de antologio de la bulgara prozo kaj poezio estas aplaŭdinda iniciato. Ĝi prezentos al la fremdlandaj esperantistoj la tutan nian kulturon kaj montros al ili ĉu nia nacio meritas la nomon kultura, kaj sur kiu ŝtupo de la ŝtuparo de la civilizacio ni staras. Pro tio la kunmeto de antologio ne estas facila kaj malserioza afero. Ĝi postulas unue (kaj plej grave) perfektan konon de la literaturo el kiu oni kunmetos kaj samtempe la kunmetanto devas posedi bonan elektoguston kaj takskapablon. La antologio devas prezenti la plej belajn kaj plej „bulgarajn" verkojn de la literaturistoj. En ĝi devas esti nenio superflua, nenio sensignifa. Nur tiam la antologio estos bone veninta, nur tiam ĝi estos neanstataŭigebla propagandilo en la manoj de la esperantistoj. En mala okazo, ĝi estos malutila, malutilega eĉ.

La antologio similas konstruaĵon, kies planon ellaboras sperta inĝeniero-kunmetanto kaj kiun la masonistoj-tradukintoj konstruas sub la inĝeniera gvidado.

Pri la „Bulgara Antologio" de Krestanov ni devas diri, ke ĝi estas malbona konstruaĵo. Vere, sinjoro Krestanov estas bona masonisto, perfekta tradukisto, sed li estas fuŝinĝeniero.

Ni parolu kun faktoj.

En sia postparolo sinjoro Krestanov diras, ke por kunmeti la antologion lin instigis „kelkaj fremdlandaj esperantistoj" kiuj „mirante pri la multnombreco de la bulgaraj literaturistoj esprimis la deziron legi iliajn verkaĵojn por *povi taksi ilian valoron*". Vere, la bulgaraj poetoj kaj verkistoj estas multaj. Kaj ĉu pro tio ni trovas la nomojn de 40, vorte *kvardek* bulgaraj „plumistoj"? Kvardek literaturistoj! Multe, ĉu ne? Ho ne, estas ankoraŭ multaj, multaj! Sinjoro Krestanov diras, ke pro multaj kaŭzoj ankoraŭ multajn literaturistojn, kiuj „distingiĝis", li ne povis enantologiigi.

Bulgario — lando de la literaturistoj! (Ja, ĉiu plumtenanto estas „plumisto", ĉiu enamiĝinto — poeto). Se estas tiel sinjoro Krestanov devis esti senindulga kribri-kritikisto dum la elekto. Li devis esti severega aplikanto de la latina principo: „Non multa, sed multum", t. e. doni „multon ne kvante, sed kvalite". Nur tiam la antologio ne povus „fariĝi tro granda" . . .

Kelkai faktoj. St. Ĉilingirov, Iv. St. Andrejĉin, Evgenia Mars, Nik. Vas. Rakitin devis foresti de la „Antologio". Anstataŭ ili, Vazov, kies epigonoj kaj imitantoj ili estas, devis esti prezentita per pli multaj kaj pli trafe elektitaj verkaĵoj.

Kian signifon por la bulgara literaturo havas Jordan Kovaĉev, Nenĉo Iliev k. a.? Ankaŭ ili devis esti for. Georgi H. Bonev, Nikola Naĉov, M. Georgiev jam delonge estas en la polvozaj arkivoj de la bulg. literaturo. Ljuben Karavelov estas nek poeto, nek verkisto. Li estas simple ĵurnalisto!

Alia eraro. Nia granda poeto Hristo Botev estas prezentita per *du* versaĵoj, kaj preskaŭ la sensignifa kompare al li Nik. Vas. Rakitin per *tri!* Kial?

Kial en la „Antologio" mankas la nomoj de Em. p Dimitrov, Hristo Jasenov, Ljudmil Stojanov? En la enesto de tiom da

superfluaj forgesitaj kaj jam ne legataj poetoj la manko de niaj bonaj nuntempaj poetoj estas evidenta kaj nepardonenda eraro.

Sinjoro Krestanov diras en sia postparolo ke „la materialo estas plejparte tradukita“ de li. Sed kial li ne subskribis la tradukintojn de la cetera materialo, se ne sub la tradukaĵoj, almenaŭ en la nomaro sur la lastaj paĝoj. Ĉu tio ne estas aŭtormanio aŭ simple alproprigo de fremda posedaĵo?

Laŭ la sinsekvo de la verkistoj la „Antologio“ prezentas ĥaoson, malordon. Komence la literaturistoj estas prezentitaj kronologie, je la mezo la ĉenaro rompiĝas, novaj poetoj estas metitaj antaŭ malnovaj, la verkistinoj estas forpelitaj je la fino kaj ĉio-ĉi prezentas . . . kaĉon.

Ĉu sinjoro Krestanov ne estas vidinta ĝis nun antologion? „Das Rosenland“ de Roda-Roda, „Антология на българскитѣ поети“ отъ Димчо Дебеляновъ и Д. Подвързачовъ, „Антология на българската поезия“ отъ Гео Милевъ estas bonaj ekzemploj.

Laŭ mia scio sinjoro Krestanov okupiĝas pri komercaj aferoj. Sed laŭ mi komerci per la bulgara literaturo, komerci per la konfido de la eksterlandanoj estas krimo. La literaturo neniam estas kreata de diletantoj! Por mi antologio de la bulgara prozo kaj poezio ankoraŭ ne estas aperinta.

Zeze.

LIBERO

ГОЛѢМО МЕЖДУНАРОДНО СПИСАНИЕ САМО НА ЕСПЕРАНТО.

Органъ на международни движения за реформиране живота въ името на любовьта и равенството между хората. Ще застжпва и „Вжтрешната Идея“ на Есперанто.

Първото международно списание, издавано въ България, поради което е и най-достжпното есперантско списание за българскитѣ есперантисти, като най-евтино:

Годишенъ абонаментъ 60 лева.

Първата книжка (въ две печатни коли) ще излезе въ края на месецъ априлъ.

Прочетете добре програмата му, която се разпраща съ настоящия брой. Разпространете го най-широко. Посочете го на приятели не есперантисти, които се интересуватъ отъ идеитѣ му, като така ги заинтересувате за Есперанто.

Есперанто ще успѣе когато почне наистина да служи въ практическия животъ — ето случай да го въведемъ въ практика всредъ идейни течения.

Всичко за LIBERO се изпраща на адресъ:

LIBERO, ул. Витошка, 48.

Samideano,

Членъ ли си на Българското Есперантско Дружество?
— *Ако не си, кое те спира да сторишъ това?*

Запиши се незабавно, ако още стоишъ вънъ отъ редоветѣ на организиранитѣ есперантисти. Малкиятъ членски вносъ (34 лева годишно) не е пречка за никого да влѣзе въ организацията и да работи съ другитѣ си съмишленици за преуспѣването на есперантското дѣло.

Есперанто се нуждае отъ подкрепата на всички свои привърженици. Ако всички се обединятъ, всѣкиму ще се падне толкова малъкъ дѣлъ отъ общата работа, че той ще може съвсемъ лесно да я свърши, безъ да жертвува много време, трудъ и средства, и резултатитѣ отъ работата на всички ще бждатъ голѣми, а цѣлата работа нѣма да тежи на плещитѣ само на малцина ратници — което българскитѣ есперантисти не бива да допускатъ вече!

Ако си членъ, издължилъ ли си се къмъ дружеството и мѣстната група, имашъ ли редовни документи? Провѣри и отстрани всѣка нередовность, която забележишъ. Дружеството ще бжде силно само когато всѣки неговъ членъ безъ изключение бжде напълно изправенъ и акуратенъ въ своитѣ задължения.

Нека всички се проникнемъ отъ желанието да видимъ организацията си стегната и солидна.

Четешъ ли „Bulgara Esperantisto“? Абонирай се и плати абонамента си незабавно, за да дадешъ възможность на дружеството да го издава винаги на време.

Събери абонамента и отъ всѣки познатъ на тебе съидейникъ, който още не го е платилъ. Всѣки новъ абонаментъ ни приближава съ една крачка къмъ това време, когато ще удвоимъ обема на нашето списание, като запазимъ цената му.

Работи самъ — и тогава чакай отъ другитѣ работа.

Нека всички изпълнимъ дълга си, за да се радваме съ право на резултатитѣ, които ще последватъ.

На работа за доброто на есперанто.

ПОКАНА.

Управителниятъ Съветъ на Есперантското Кооперативно Сдружение въ България, възъ основа чл. чл. 27 и 29 отъ устава, свиква членоветѣ на редовно годишно събрание въ София на 28 мартъ т. г. въ 8 ч. преди пладне въ клуба на Софийската Секция на Българското Есперантско Дружество, на ул. Паисий, № 45 съ следния дневенъ редъ:

1. Отчетъ на Управителния Съветъ и докладъ на Контролния Съвѣтъ.

2. Приемане отчета и освобождаване отъ отговорность Управителния и Контролния Съвети за дейностьта имъ презъ отчетната година.

3. Разпредѣление печалбитѣ и загубитѣ.

4. Бѫдаща дейность на сдружението.

5. Избиране 2 нови члена за Управителния Съвѣтъ на мѣстото на излѣзлитѣ по жребие: Георги Фандъковъ и Д. Симеоновъ, на новъ Контроленъ Съветъ и на запасни членове за Управителния и Контролния Съвети, и

6. Разни.

Ако събранието не се състои на гореозначената дата по неявяване на достатъчно членове, съгласно чл. 32 отъ устава, то се отлага *безъ особена покана* за 29 мартъ с. г., 9 часа сутриньта въ сѫщото помѣщение, колкото и членове да се явятъ.

София, 10 мартъ 1925 год. **Отъ Управителния Съветъ.**

Балансъ

Да дава — на 31 декемврий 1925 година — Да зема

Да дава			Да зема		
1. Каса	42	55	1. Капиталъ	9.500	—
2. Дебит. и кредитора	10.912	05	2. Резервенъ фондъ .	540	—
3. Издания	3.367	—	3. Консигнатори . . .	2.251	55
4. Учред. разноски . .	2.318	—	4. Печалби и загуби .	4.348	05
	16.639	60		16.639	60

Ведомость

за загубитѣ и печалбитѣ за времето отъ 1. I. до 31. XII. 1924 година.

Загуби			Печалби	
За канцел. разходи и порто . .		2.855·20	Отъ продажба на книги .	9.362·25
Заплати		2.000·—		
Погашение учред. разноски . . .		1.159·—		
		5.014·20		
Чистата печалба се разпределя:				
50°/₀ фондъ пропаганда . .	2 174·—			
30°/₀ резервенъ фондъ . .	1.304·80			
2°/₀ фондъ несъбир. вземания	86·95			
5°/₀ възн. Упр. и К. Съвети	217·40			
Остатъкъ за 1925 год. . .	565·30	4.348·05		
		9.362·25		9.362·25

Счетоводитель: Д. Симеоновъ.

Контроленъ съветъ: Г. Актарджиевъ, Г. Орешковъ, Ст. Минковъ

До Шуменъ
Илия Силвестриевъ,
Отецъ Паиси, 28

ЕСПЕРАНТИСТИ!

Набавяйте си и разпространявайте преди всичко изданията на Българското Есперантско Дружество, съ което го подпомагате да бжде финансово засилено.

Курсъ по Есперанто, IV издание . . . . 20·— лева
Практична граматика на межд, езикъ Есперанто . . 3·— „
Възможенъ и нуженъ ли е единъ межд. помагаленъ езикъ (проф. Д-ръ Ив. Шишмановъ) . . . . 3·— „
Първа конгресна речь на Д-ръ Заменхофъ. . . . . 2·— „
Врора „ „ „ „ „ . . . . 2·— „
Трета „ „ „ „ „ . . . . 2·— „
Четвърта и пета „ „ „ „ . . . . 2·— „
Портретъ на Заменхофъ (30/45 см.) . . . . 10·— „
Пощенски карти (Заменхофъ и отъ XI конгресъ) . . 1·— „
Пропагандични пликове . . . . 0·35 и 0·60 „
Есперантски значки (зелена звезда съ надпись „Есперанто", зелена звезда на бѣло поле — малки, зелена звезда на жълто поле и наоколо зеленъ кржгъ съ надписъ) — съ игла, брошка или за втикване въ дупка, (6 вида) по 12, 13, 16 и 20·— „
„Literatura Mondo", год. II, 12 книжки . . . . 120·— „
Отдѣлни броеве отъ сжщото списание . . . . 12·— „
Стари броеве отъ „Esperanto Triumfonta" . . . . . . 6·50 „
Броеве отъ II, III, IV и V год. на „Bulgara Esperantisto" 1·50 „
Освенъ това се доставятъ:
Речникъ еспер.-бълг. отъ Хр. Бъчваровъ, подвързанъ 48·— „
„ „ „ „ „ неподвърз. 35·— „
Речникъ есперанто-български и български-есперанто отъ Ив. Кръстановъ . . . . 47·— „
Bulgara Antologio отъ Ив. Кръстановъ . . . . 100·— „
Сжщность и бждащность на идеята за единъ международенъ езикъ отъ Unuel . . . . 7·— „
За международния езикъ (анкета) . . . . 5·— „
Ŝercoj kaj incitoj, игра за говоримо изучване на есперанто, състояща се отъ 100 въпроси и 100 отговори . . . 60·— „
Ключъ на Есперанто (граматика и речниче) . . . . . 3·50 „
Прибавяйте 20°/₀ за пощенски разноски.
За пощенски разноски на звездичка прибавяйте 3 лева, а по 5 лева за две и повече.

REDAKCIA KOMITATO:

Dimitr Simeonov. — Zahari K. Zahariev. — Asen Grigorov.

Adreso de la redakcio: Sofio (Bulgario), str. Car Boris, 69.

София. — Печатница Б. А. Кожухаровъ. — Телефонъ 1894.